

**La babiladaj rondoj okazas vendrede je la 19-a horo.**

La gastiganto mem preparas simplan manĝaĵon (ĉefmanĝon kaj deserton). La invititoj alportas **nur** trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. Okaze de kunveno ĉe Espace Dickens, la gastiganto preparas terpomojn kaj deserton. La gastoj alportas fromaĝojn, trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn.

**Ambaŭgrupa babilada rondo** okazos **ve, la 16-an de novembro** je la 19-a, ĉe Espace Dickens, organizota de Monique kaj Ĝiulio.

Ne forgesu aliĝi al "Doodle"

**"Okcidenta grupo":**

**Ve, la 2-an de novembro**

ĉe Rosario Scopelliti

Ch. de Barberine 6, Lausanne

021 648 76 44 / 079 264 41 08



Aliĝu ĉe:

<http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd>

**"Orienta grupo":**

**Ve, la 9-an de novembro**

ĉe Charlotte Blanc Maillard

Avenue Nestlé 7, Vevey

021 922 34 74 / 079 393 32 63



Aliĝu ĉe:

<http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6>

**Komitata informo:** Ne forgesu pagi vian jaran kotizon antaŭ la fino de la jaro 2018. (CCP 10-26785-8 - sFr 60.-)

Kelkaj membroj iros al Montrealo en la UK-on de 2020. Ni do decidis krei sparujon (cagnote) en nia kaso. Pagu ĉiumonate, kiom vi deziras, skribante la vortojn MONTREALO 2020. *Se vi bezonas pagilojn, telefonu al 076 369 29 17.*

## Laŭzana Esperanto - Societo

ĉe F. Randin - ch. de Vallombreuse 14 \* CH - 1004 LAUSANNE

+41 21 647 29 28 \* sekretario@eo-l.ch - poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

<https://www.facebook.com/esperantolausanne>

Prezidanto.: David Buhlmann \* 021 624 36 38

Vice-prezidanto.: Charlotte Blanc Maillard \* 079 393 32 63

Sekretario: François Randin \* 076 369 29 17

Kasisto : Françoise Pétermann \* 079 517 44 43

Redaktoro de la informilo : Rosario Scopelliti \* 079 264 41 08

# Laŭzana Esperanto - Societo

## Informilo

novembro 2018 - n° 09

Kunsidoj normale okazas ĉiumonate  
ĉe Espace Dickens, rue Dickens 6, Lausanne

**Lunde, la 5-an de novembro, je la 20-a**

La partoprenintoj de la

**UK 2018 en Lisbono, Portugalio**

Elisabeth - Maryse - Cléa - Gilbert - François - Rosario

parolos al vi pri siaj memoraĵoj.

**Sabate, la 15-an de decembro**

➤ Zamenhofa festo en Epalinges

*Feliĉan Novjaron 2018*

**Lunde, la 7-an de januaro**


➤ Decidota

**Lunde, la 4-an de februaro**

➤ **Ĝenerala Asembleo**

**Lunde, la 4-an de marto**

➤ Decidota



**HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)**

1. Severe, pike; 6. \_\_\_ tagon !; 7. Komenca sillabo de Odro; 8. G; 9. Estas bemolo aŭ dieso (akuzativo); 11. La sumera diino de seksa amo, fekundeco kaj milito.

**VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)**

1. Subskribi, monoferi; 2. Leĝaron, ĉifron; 3. Mallongigo de Unuiĝintaj Nacioj; 4. Bonan \_\_\_ !; 5. En la helena mitologio nimfo el Troado, filino de rivera dio Kebreno; 10. Simbolo por tantalo je kemio.

Sabate, la 15-an de decembro 2018 je le 11-a



**ZAMENHOFA FESTO**

Kiel kutime, ni festos la naskiĝdatrevenon de L.-L. Zamenhof.

Ĝi okazos kiel lastjare ĉe  
**Auberge communale  
d'Épalinges**  
Rte de la Croix-Blanche 27

- **Bonvolu nepre aliĝi antaŭ la 8-a de decembro**, pagante la sumon al la konto ccp 10-26785-8 (Laŭzana Esperanto-Societo) kun mencio "Zamenhofa festo".

*La Laŭzana Esperanto-Societo pagos la trinkaĵojn kaj la kafojn.*



## 14. LEONA SUKCESO (Vere aŭ fantazie - C. Piron)

Ne malproksime de vilaĝo, sed ankaŭ ne proksime al ĝi, samloke vivis homo kaj besto. La homo estis virino, la besto leonino.

Videblis, ke la virino baldaŭ naskos infanon, kaj same ankaŭ la leonino havis en si idon, kiu certe naskiĝos post ne tre longe.

Fakte, ambaŭ inoj naskis samtempe, tiel ke la knabeto kaj la leonido komencis sian vivon unu apud la alia. Ĉiumatene la virino kaj la leonino foriris por serĉi manĝaĵon, kaj la infano restis kun la leonido. Ambaŭ ludis kune kaj bone amuziĝis. Ambaŭ lernis la multegajn aferojn, kiujn vivo instruas al tiuj, kiuj ĉiutage interrilitas kun naturo.

Tiel la ido de homo kaj la ido de leono kune kreskis. Ili diris unu al la alia, ke, kio ajn okazu, neniam ili disiĝos. La leonido sciis, ke ĝi estas la pli forta, kaj ĝi promesis al la hometo, ke ĝi defendos lin kontraŭ ĉiaj danĝeroj, kontraŭ ĉiaj malamikoj.

Sed venis terura tago. Foje, ja, la leonino ne sukcesis trovi beston, kiun ĝi povis mortigi por alporti al la ido, tiel ke ambaŭ povu sate manĝi ties viandon. La du malsatis, kaj malsato kaŭzas suferon. Ĉi-foje ĝi krome kaŭzis koleron: la leonino koleras pri sia malsukceso trovi viandon, kaj ankaŭ pro la timo perdi sian famon de bona viando-donanto por sia ido. La kolero perdis al ĝi la kapon. La leonino saltis sur la virinon, kaj ŝin mortigis. Ĝi alportis la korpon al sia leonido, por ke tiu satiĝu manĝante el ĝi.

Sed la leonido siavice ekkoleris kaj malkonsentis manĝi. Ĝia amiko, al kiu ĝi sin ligis per por-tut-viva promeso, ploris kaj ploregis. Kaj tio igis la leonidon tiel malfeliĉa, ke ĝi decidis mortigi la propran patrinon. Jes, ĝis tio ĝin venigis la promeso resti por ĉiam korlignita al sia amiko. Alsaltita de la ido, la leonino baldaŭ mortis.

Vi certe komprenos, ke la du amikoj ne plu povis vidi la lokon, kie okazis tiuj teruraĵoj, kvankam estis la loko, kie ili kune travivis sian infanecon kun multe da ludoj, ridoj kaj plezuro. Ili do decidis foriri.

A	K	U	T	E
B	O	N	A	N
O	D		G	O
N	O	T	O	N
I	N	A	N	O

*daŭrigota*